

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2010



Esperanto-ekspozicio en la urba biblioteko de Turku. Sur bretaro estis foliumeblaj libroj kaj videblaj afiŝoj pri kongresoj el diversaj jardekoj. Artikoloj sur paĝoj 7-8.

Vintraj Tagoj en Jyväskylä, p. 14

Voĉoj el Haitio, p. 6 ♦ Wolmar Schildt kaj finna ortografio, p. 10

Surogato-Vekilo, p. 18 ♦ amDeca FEJO-paĝo, p. 19

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 7793 487 ✉ esperanto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Liisankatu 5 B 44, 00170 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Arvo Karvinen, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 ✉ arvo.karvinen@elisanet.fi

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaleto@kolumbus.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avooinna tiistaisin klo 17-19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Homarujo, Esperantujo

En la 13-a de januaro tagmeza radioelsendo: Tertremo en Haitio. Oni scias, ke estas forta, apud la ĉefurbo aŭ en la urbo mem, domoj detruitaj kaj homoj mortintaj.

En sekvintaj semajnoj amasiĝis kaj ĥaosis informoj pri la katastrofo. La centro de la tertremo estis 25 kilometroj de la ĉefurbo, kiu estis grandparte detruita. Homoj estis mortigitaj kaj vunditaj sub frakasitaj domoj. Retoj de akvo kaj kloakoj, elektro kaj komunikado, malaperis en sekundoj.

Post tri semajnoj ni scias, ke el la dek milionoj da enloĝantoj eĉ ducentmil estas mortintaj, centmiloj vunditaj kaj perdintaj hejmon kaj vivtenon. La vivo de almenaŭ tri milionoj estas rekte tuŝita de la katastrofo.

La Haitianoj estas viktimoj de ne nur la januara tertremo. Ili estas viktimoj de krimo. La plej grava krimo estas la malriĉeco. Ĝi estas socia krimo. Socio kiu permesas senesperan malriĉecon, ne agas homece. Socia malriĉeco multobligas homajn suferojn en situacioj, kie necesas kunordigita agado.

Pasinta jaro estis la ducenta de la Finnlanda ŝtato. La principe sendependa Haitio estas samaĝa: En 1804 armeo de sklavoj venkis la Francajn trupojn kaj proklamis ŝtaton. La loĝantaro preskaŭ tute konsistis el sklavoj Afrikaj, venigitaj post cinika ekstermo de la eĉ trimiliona indiĝena loĝantaro. La lando, la okcidenta duono de la insulo Hispaniolo (la orientan duonon koloniigis Hispanio) estis granda produktanto de kafo, kakao, sukero; lando riĉa, laboranta popolo malriĉa. La riĉeco konsistis el naturo kaj homoj. Francio postulis kaj en 1833 sukcesis devigi Haition pagi rekompencan pro la

perdita laborforto sklava. Por tiu rekompenco, la nova ŝtato devis prunti sumon, kies repagado al Franciuj, Usonaj kaj Germaniuj bankoj daŭris ĝis jaro 1947. Ĝis 1947, centkvardek jarojn post la ekformado de ŝtato! La sumo kun interezoj estas kalkulita 27 miliardojn da dolaroj. Nia historio ankaŭ kalkulas multajn cinikaĵojn dum la pasintaj ducent jaroj, sed ne tian sklavhistorion – ankaŭ ne kiel sklaviganto. Bonŝance.

La nuntempa internacia komunumo disponas pri fortoj kaj iloj por helpi en katastrofaj okazoj. Multaj ŝtatoj estas solidaj kaj agokapablaj. Ni ankaŭ havas internaciajn organizaĵojn. El tiuj la plej komuna estas Unuiĝintaj Nacioj, kaj el ĝiaj membroj plej fortaj estas relative grandaj kaj bonhavaj ŝtatoj, inter tiuj Finnlando. La tagon post la tertremo, UNO asignis dek milionojn da eŭroj por unua helpo. (Hazarde, samtage Usono decidis pri pliaj 33 miliardoj da dolaroj por la militoj en Irako kaj Afganio.)

Usono kaj civitanaj organizaĵoj tie estas naturre la plej masiva helpanto al la malfeliĉaj tertremaj viktimoj. Por efektiviĝi helpon, necesas uzi ekzistantajn materiajn eblecojn. Necesas kunlaboro, kaj por kunlaboro necesas cedi en politikaj starpunktoj. En Karibio tiuj staras forte kiel muroj de miljaroj, kaj la plej akra kontraŭdiro estas inter Usono kaj Kubo, kiu situas nur cent kilometrojn okcidente de Haitio kaj ducent sude de Usono. Por iom kompreni la rilaton, ni povus imagi enpense, ke Finnlando estintus dum lastaj kvindek jaroj grave blokita en internacia komerco; ŝtato de multaj aferoj estus tute alia.

Nun tamen, dum la post-tertrema periodo, la najbaroj kunlaboras en la helplaboro. La unuan fojon Kubo permesis flugojn de usonaj armeaj aviadiloj super la insulo de la militbazo Guantánamo. Tio estas tute senprecedenca, ĉar Kubo ne rekonas la kontrakton pri luado de tiu militbazo. Tiuj flugoj transportas materialojn ▷

Vico da amasaj mortigoj diskutigas Finnlandon

Unue estis eksplodo en komercejo Myyrmanni en oktobro 2002. Mortis sep homoj kaj vundiĝis preskaŭ 200. Tio estis nur unuopa okazo fare de frustriĝinta juna viro.

Venis pafado en lernejo de Jokela en novembro 2007. Mortis naŭ homoj, inkluzive la pafinton, kiu post mortigi aliajn mortigis sin mem. Ankoraŭ oni ne vidis multan kaŭzon ligi ĉi tiun okazon kun tiu en Myyrmanni.

Venis pafado en metilernejo de Kauhajoki en septembro 2008. Mortis 11 homoj, inkluzive ĉi tie same la pafinton mem. Oni jam komencis diskuti, ĉu estas io profunde malorde en la finna socio, ĉar ripete okazas amasaj mortigoj. Ankaŭ eksterlande Finnlando jam akiris ioman tristan famon: ĝi estas lando de koleraĵ junaj viroj, kiuj izolas sin el la normala vivkomunumo kaj per interreto disvolvas detruajn planojn – pli-malplian ĉi tiuj tri uloj ĉiuj faris.

Nur plia jaro daŭris kaj venis pafado en komercejo Sello en la lasta tago de jaro 2009. Mortis kvar homoj tie, kaj en aliaj lokoj la pafinto mortigis sian ekskarulinon kaj sin mem. Denove Finnlando staris en rubrikoj de ĵurnaloj en aliaj landoj pro esti okazejo de amasaj mortigoj. Oni ne povas nei, ke Finnlando staras proporcie kun sia loĝantaro nenature alte en la statistikoj.

Iun tre unuecan tipon la kvar okazoj ne reprezentas. La Myyrmanni-okazo distingiĝas de la aliaj tiel, ke ĝi estis farita per bombo, dum la aliaj per pafado, kaj oni ne scias, ĉu la farinto intencis mem morti, ĉar klaran memmortigan mesaĝon oni ne trovis, kaj fine oni konkludis, ke la bombo eksplodis akcidente per misfunkcio de la iniciata mekanismo. La Sello-okazo distingiĝas de la aliaj en multaj aspektoj: Ĝia farin-

to ne estis tiom juna kaj aktiva uzanto de interreto, kiel la tri aliaj, kaj li havis personan motivon kontraŭ sia ekskarulino, dum la tri aliaj havis pli ĝeneralan haton kontraŭ la komunumo, kie ili sentis sin mistraktitaj. Klaran inter si similtantan paron formas nur la okazoj de Jokela kaj Kauhajoki, sed el tiuj ni ja scias, ke la farinto de la posta konscie imitis la farinton de la unua.

Unu komuna trajto estas, ke ĉi tiuj kvar kulpuloj estis ĉiuj viroj. Sed facile oni povas memorigi pri jaro 1999 kaj okazo, kiam virino en Helsinko mortpafis grupon da homoj. La kvanto da viktimoj restis en tri, sed laŭ sia tipo tiu pafado estas tre ekvivalenta. Nenia novaĵo ja estas, ke virinoj faras krimojn, speciale violentajn kaj mortigajn krimojn, malpli ol viroj.

Plian trajton en la debatojn post la Sello-okazo portis la fakto, ke ĝia farinto ne estis denaska finno, li estis enmigrinto el Kosovo – kaj ne akirinta finnan civitanecan pro faritaj krimoj. Pro tio ja nepra fenomeno estis, ke iuj proklamis, ke nun la enmigrintoj kunportas siajn malbonajn kutimojn en Finnlandon kaj detruas la pacan finnan socion. Postulata estis, ke oni sendu ĉiujn krimozajn eksterlandanojn for el al lando. Sed en tio ja oni devis forgesi, ke Finnlando jam antaŭ la okazo de Sello elstaris en la statistikoj pri mortigaj krimoj. Alia ekstremo de la debato estis aserti, ke tiel eĉ enmigrinto adoptas la tipan finnan agmanieron kaj post siaj frustriĝoj mortigas aron da homoj.

Krimstatistikoj inter diversaj landoj estas tre malfacile kompareblaj, pro multaj kazoj, ekzemple: En iuj landoj serio da krimoj faritaj de



unu homo kalkuliĝas unu, en aliaj landoj pluraj; En iuj landoj krimo enskribiĝas en statistikojn nur post juĝo, en aliaj landoj jam pro anonco al la polico; Nivelo de puno por la sama ago diversas en diversaj landoj; Emo de homoj anonci rimarkitan krimon al polico diversas en diversaj cirkonstancoj. Sed kiom oni povas konsideri la statistikojn fideble kompareblaj inter Finnlando kaj aliaj landoj, kiuj kredeble havas proksimume similajn cirkonstancojn, t.e. ĉefe Svedio kaj aliaj nordiaj landoj, unu tendenco videblas: En Finnlando okazas pli multe da mortigoj kaj aliaj violentaj agoj. Kaj aliflanke, pri Svedio oni scias, ke la finndevenaj loĝantoj faras tiujn krimojn pli ol ceteraj loĝantoj. Io estas malbone en la finna menstipo: ni estas ĝenerale trankvilaj homoj kaj ne facile komencas kvereli, sed samtempe ni estas malbonaj en diskutado, speciale pri niaj personaj problemoj. Post akumulado de malicaj pensoj ni agas violence.

Kiel ajn estas la statistikoj kaj averaĝoj, oni ne povas juĝi homojn per ili. Ĉiu krimulo aŭ eventuala krimulo estas individua kazo kaj bezonas individuan juĝon aŭ kuracon.

Estas facile diri, ke oni sendu krimozajn eksterlandanojn for el la lando. Tion ja oni ankaŭ faras. En ekstremo tio tamen rezultus, ke ni ĉiuj sendus violentajn homojn el propra lando al alia, kaj tiel oni ne solvas la bazajn problemojn. La oficialuloj devas havi kongruan sistemon en tio, kaj sekvi la leĝojn faritajn por tio. Kaj speciale indas konsideri, ke se Svedio volus sendi ĉiujn finndevenajn krimulojn en Finnlandon, tiam ni havus problemon.

Almenaŭ la ripetigo de mortigaj okazoj kaŭzis en Finnlando vastan diskuton pri sekureco, leĝo pri pafiloj kaj mensa malbonfarto kaj ĝia traktado. Ŝanĝo de leĝo pri pafiloj estas preparata kaj kutimoj de la polico en permesoj por aĉeti pafilon verŝajne ŝanĝiĝas. Perfektan sekurecon la socio atingas neniam, sed ia progreso estas antaŭvidata.

Mikko Mäkitalo

(de la prezidanto) ▷

por helpi al la viktimoj. Ĉe la viktimoj laboras helpantoj el diversaj anguloj de la mondo, tre multaj el ili el najbaroj, sed ne kiel Kubanoj kaj Usonanoj, sed kiel homoj kaj homoj. Estas io nova, kaj, ni emu kredi, esperiga.

Venontan someron esperantistoj veturos al Kubo por Universala Kongreso. Urbego Havano ne riskas tertremon, kaj la vasta tropika insulo akceptas siajn gastojn kun bonvolo, amikemo kaj sekureco. Nia privilegiita regno, Esperantujo, tie kolektiĝos por sia ĉefa festivalo kaj demonstracio. Sed la vasta Esperantujo troviĝas ĉie, kie estas niaj samideanoj. Ankaŭ en Haitio la lumo de la esperantismo esperige brilas, kiel raportite aliloke en ĉi tiu gazeto. Ni trovu eblecojn subteni.

Katastrofojn naturajn kaj krimojn sociajn kontraŭbatalas progresmovadoj, kiuj rekonas la homan dignon. Solidareco estas digno dividita al ĉiu. Ni solidaru inter ni kiel samideanoj, kaj kiel samideanaro ni solidaru kun la homaro.

Tuomo Grundström

Eventokalendaro de EAF

2010

- 26.–28.2.2010 FEJO-semajnfino kun jarkunveno en Tampere
- 13.–14.3.2010 Vintraj Tagoj en Jyväskylä
- 27.6.–2.7.2010 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi
- 17.–24.7.2010 Universala Kongreso de Esperanto, Havano, Kubo
- 24.–31.7.2010 Internacia Junulara Kongreso, Santa Cruz del Norte, Kubo
- Aŭtunaj Tagoj en septembro, eble en Estonio

Laborkunsidoj

- 13.2.2010 Estraro

Vivo daŭras en Haitio

Kubaj kuracistoj helpas

La tertremo kiu trafis Haition la 12-an de januaro 2010, skuis la mondon. 80% de la konstruaĵoj detruigis, pli ol 150 000 homoj perdis la vivon. Centmiloj perdis ĉion kaj postrestas ofte kun grava handikapo. La venontajn semajnojn multnombraj personoj mortos pro manko de higieno kaj pro diareo kaj bronkito.

Feliĉe la internacia medicina helpo rapide ekis. Apenaŭ konata estas la fakto, ke Kubo ekde 1998 laboregas en Haitio por efektiviĝi integran sanplanon, al kiu 6 000 kubanaj kuracistoj kaj paramedicinistoj partoprenas kaj donas sian tutan atenton. En tiu kadro preskaŭ 400 kuracistoj estis surloke en la momento mem de la katastrofo. Ilia ĉeesto estis esenca por helpi kaj kuraci la popolon dum la unuaj 72 horoj. Tuj post la tertremo, Kubo sendis ankoraŭ 60 specialistojn de la medicina brigado Henry Reeve, speciale trejnitaj kaj bone ekipitaj specialistoj por interveni okaze de katastrofo. 400 Haitiaj kuracistoj kiuj studis en Kubo aldoniĝis al la Kubaj medicinaj helpantoj. La kubaj kuracistoj transformis iliajn restadejojn en malsanulejojn. Malgraŭ ke la komunikiloj mutas pri la Kubana helpo, la 24-an de januaro, do dekdu tagojn post la fatala skuo, la Kubaj kuracistoj kuracis jam pli ol 18 000 pacientojn kaj faris 1 700 operaciojn.

Kontaktostreboj kun esperantistoj

Estas ankaŭ esperantista komunumeto en Haitio. Jen kiel skribas kolombia esperantisto Ruben Torres pri streboj kontakti kun haitianoj post tertremo:

Mi estas amiko de Christine Theano, esperantistino el Haitio.

Post kelktaga serĉado finfine Christine aperis la 22-an de januaro, kvankam ŝia mesaĝo estas tre magra. Feliĉe ŝi vivas, sed mi ankoraŭ scias nenion pri ŝia nuna stato. Mi komprenas, ke la komunikado kun Haitio ankoraŭ estas ege malbona, sed tuj kiam mi ricevos konfirmon pri la situacio de nia Christine, mi distrumpetos ĝin serĉe de helpo. Estas alia esperantisto el Petion Vile, tre proksime al Portoprince, kies nomo estas Michelet Michel. Kaj nun li estas serĉata de lia frato loĝanta en Usono. Pri la aliaj (ĉirkaŭ 20) esperantistoj de Portoprince, mi aŭdis nenion ĝis hodiaŭ.

Kontaktia Haitiin

Kolumbialainen esperanton harrastaja Ruben Torres kertoo yllä siteeratussa kirjeessään, miten hän on yrittänyt ottaa yhteyttä haitilaiseen ystäväänsä Christine Theanoon ja viimein onnistunutkin 22. tammikuuta. Hän kertoo, että ainakin 20 muuta esperanton harrastajaa Haitissa tiedetään olevan.

Alvoko al jarkunsido

Jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj ELFI okazos sabate la 13an de marto 2010 je la kvara en Jyväskylä en la ejo de NNKY, Puistotori 4. Estos traktataj la laŭstatutaj aferoj.

La estraro

Kutsu vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n vuosikokous pidetään lauantaina 13. maaliskuuta 2010 klo 16.00 Jyväskylässä NNKY:n tiloissa, Puistotori 4. Käsittellään sääntömääräiset asiat.

Hallitus

Esperanto-ekspozicio en la urba biblioteko de Turku

Mi vizitis la urban bibliotekon de Turku fine de januaro, ĉar mi aŭdis, ke oni starigis tie ekspozicion pri la internacia lingvo kaj deziris vidi ĝin.

La biblioteko ĉe Linnankatu nuntempe loĝiĝas en du domoj: nova, moderna, lumoplena parto estas hejmo de plejmulto de la bibliotekaj kolektoj dum la klasikstila malnova domo estas dediĉita al la temo "arto". Inter la du domoj troviĝas ankaŭ kafejo, kie ofte kunsidas esperantistoj de la urbo.

Mi grimpis al la dua etaĝo en la nova domo. Tie, en parto titolita Tietotori, "informa bazaro", mi trovis la ekspoziciaĵojn. Unue mian atenton kaptis kvar afiŝpaneloj starigitaj ĉe rando de balustrado. Tiuj havis po unu afiŝo ambaŭflanke, do sume ok informplenajn tekstojn pri la lingvo, pri ĝia historio, pri UEA, pri ebloj kaj rimedoj por lerni la lingvon kaj, kompreneble, pri la lingvo kaj ĝiaj uzantoj en Turku. La teks-

taro eble ne estas la plej tuja allogilo en la ekspozicio, sed ĝi bone servas tiujn, kiuj ekinteresiĝas kaj volas pli scii. Eblas elekti legaĵon laŭ sia intereso. Estis libere haveblaj ankaŭ faldfolioj kaj, tre grave, informilo pri komenciĝanta nova kurso en Turku.

Sur unu bretaro estis kolektitaj specimenoj pri lernolibroj. Ĉiuj krom unu apartenis al la regula kolekto de la biblioteko; nur la ĵus aperinta finna versio *Esperanto mutkattomasti* de la lernilo de Stano Marĉek ankoraŭ ne portis stampon de la biblioteko. Apude estis metitaj pli ol dudeko da kolorplenaj kongresaj bultenoj. En la supra vico elstaris la kongreslibroj de la tri Universalaj Kongresoj aranĝitaj en Finnlando: Helsinki 1922, Helsinki (kaj Espoo) 1969 kaj Tampere 1995.

Unu vitra monroŝranko prezentis filatelaĵojn kun Esperanta temo, el la kolekto de Anna-Liisa Ali-Simola. Apuda simila kesto prezentis ▷



En vitrino videblaj estis kelkaj pliaj libroj kaj kompaktdiskoj kaj poŝtmarkoj.

aŭdvidaĵojn kaj kelkajn verkojn el Finnlando.

La aranĝo estis kompetente kaj taŭge farita. Ne estis trudata tro da informoj, sed elektitaj detaloj spekteblaj eĉ nur preterpase. Interesito povis laŭplaĉe profundigi en la tekstojn de la afiŝaro.

Mi opinias, ke la ekspozicio meritas esti starigita ankaŭ en aliaj lokoj. Ne estas tro malfacile fari adaptaĵojn al aliurbaj kondiĉoj: forpreni la detalojn, kiuj interesas precipe nur turkanojn, kaj aldoni alilokajn informojn kaj eble eĉ alilokan koloron. Se temas pri lokoj proksimaj, ekz. bibliotekoj en najbaraj komunumoj, oni povas eĉ senŝanĝe ekspozicii ĉion plene laŭ la Turkua maniero.

Ampleksa kolekto de Esperanta literaturo

Do, mi estas kontenta pri la ekspozicio, sed eĉ pli kontenta mi estas pri la normala agado de la biblioteko. Tie estas escepte ampleksa kolekto de Esperanta literaturo. Ne nur tiuj unu-du lerniloj, kiujn oni povas trovi en multaj bibliotekoj,

Ekspozicio kaj gazeta artikolo en Orimattila

”Esperanto-näyttely Orimattilan kirjastossa” estis la rubriko de 19x19cm granda artikolo kun bildo en Orimattilan Sanomat, la loka gazeto de urbo Orimattila, aperinta 19.1.2010. La ekspozicio en la biblioteko estis inter 7.1. kaj 22.1. La redaktorino min intervjuis mallonge kaj miajn eble tro modestajn eldiraĵojn ekz. pri la kvanto de esperantistoj la redaktorino komprenis eĉ tro realisme: ”Vaikka esperantontaitajia on hyvin monissa maissa, ei heitä Erikssonin mukaan kuitenkaan ole kovin paljon”. Tamen pri la lingvo mem la teksto estas sufiĉe kontentiga. La redaktorino partoprenis ankaŭ en la konkurso kiun estis konekte al la ekspozicio.

Börje Eriksson

sed trideko da lerniloj surbrete kaj aparta sekcio por esperanta literaturo: dramoj, poezio, romanoj, faka literaturo. Tion povas nur envie rigardi mi, loĝanto de urbo pli granda ol Turku. Ankaŭ sur la bretoj por periodaĵoj mi vidis gazetojn esperantajn.

Ekzistas eblo prunti librojn interbiblioteke, ĉu ne? Alilokanoj bonvolu utiligi la eblon.

Gratulon al la Esperanto-societo en Turku por bona ekspozicio. Kaj gratulon al la Societo kaj al la urbo Turku por impone bona publika biblioteko.

Harri Laine

Biblioteka ekspozicio translokiĝis el Turku al Kaarina

La ekspozicio Esperanto, kiehtova kieli (Esperanto, fascina lingvo) troviĝis en la ĉefbiblioteko de Turku pli-malpli la tutan januaron. Multaj esperantistoj vidis ĝin kaj ni en Turku estas fieraj kaj feliĉaj pri la laŭdaj vortoj. Koran dankon al ĉiuj vizitantoj.

La pli-malpli sama ekspozicio estas nun en la ĉefbiblioteko de Kaarina 1.–27.2.2010. En la loka gazeto Kaarina-lehti jam estis informo pri ĝi. Same kiel en Turku, Esperanto estas prezentita multflanke pere de 8 afiŝoj kaj kun multaj kongresaj bultenoj, krome estas libroj kaj KD:oj en vitrinaj kaj gazetoj por foliumi. Ankaŭ en Kaarina vizitantoj povas kunpreni faldfoliojn pri nia societo kaj informpapereton pri la kursoj. Krome disdonitaj estas turistaj broŝuroj de Turku.

Ni esperas tra la ekspozicioj havi pliajn kursojn kaj eble post la kurso novajn membrojn. Elkoran dankon al ĉiuj kiuj iel helpis nin starigi la ekspoziciojn, speciale al Stano Marček kaj Tuomo Grundström.

Esperanto-societo en Turku/TO

IF finis jaron en Nördlingen

La pasintjarfina 26a Internacia Festivalo (tradicie nomita IF), gastigis ĉifoje ĉ. 130 partoprenintojn el dudeko da landoj – de Hispanio ĝis Japanio. La elstara loko estis bavara urbeto Nördlingen, situanta en meteorita kratero kaj sola urbo kun complete konservita mezepoka urbomuro. Kunveno estis nova junulargastejo tuj apud la urbomuro, kio ebligas facilan aliron al la centro.

Tuttaga ekskurso estis al Nurenbergo, kie ni vizitis la kastelon, rigardis iom la urbon kaj manĝis en la plej granda kolbasorestoracio kun 300 lokoj. La fama kristnaska bazaro ja fermis, sed alia specialaĵo de la urbo estas mielkukoj, kiuj estas vendataj en bakejoj.

Bunta kaj ampleksa kiel ĉiam estis la programo, kun abunda libroservo de FEL, prelegoj kaj vesperaj muzikprezentadoj: ĝueblis rusa (kun invito al la centjara jubileo en Sankt Peterburgo kaj elstara juna talento Inga Krejson), dagestana (kun fotoekspozicio kaj gustumado) kaj israelaj vesperoj (kun prezento de kantoj, dancoj kaj la pasinta kunveno KIES en pac-oazo), krom omaĝo al la 150-jariĝo de L. Zamenhof.

Temo de IF estis ”Fabeloj”, kies specimenoj videblas ankaŭ en Jutubo, ĉe youtube.com/brilanto.

Stano Marĉek prezentis sian agadon: la revuo ”Esperanto”, sondiskojn de fabeloj, kaj la rektmetodan instrulibron (”Esperanto mutkattomasti”), kies finna versio pretiĝis nur decembre.

Pliaj interesaj programeroj estis la Internacia Vintra Universitato (IVU, kun temoj el matematiko kaj astronomio) kaj ĝemelurbaj rilatoj.

7 kandidatoj (unu el Finnlando) kaptis la ŝancon ekzameniĝi laŭ la eŭropa referenckadro, kaj tiel helpas al UEA/ILEI.

Unu kulmino kiel ĉiam estas la silvestra balo. Ĉar saŭno estis en la domo mem, kompreneble eblis ĝui tion kelkfoje.

Kiu maltrafis tiun eventon, havos plian ŝancon: La sekva IF okazos en la sama ejo, estas antaŭvidita taga ekskurso al la ĉefurbo de Bavario (Munkeno), kaj eble vizito al la bierfarejo Oettinger (en proksima urbeto) – la plej granda germana bierfarejo kun jara produktado de pli ol 6 milionoj hektolitroj da biero.

Robert Bogenschneider



Urba pejzaĝo en Nördlingen. Pliaj fotoj troveblas ĉe <http://www.ipernity.com/doc/brilanto/album/169687>

Kiel Wolmar Schildt volis evoluigi finnan lingvon kaj ties ortografion

Kiu estis Wolmar Schildt?

Li estis filo de kapitano de la finna armeo. Lia patro havis kiel salajro loĝrajton en bienego (svede: bostelle > fi: "puustelli") en meza Finnlando, en komunumo Laukaa, do meze de finningva loĝantaro, kaj tiel Schildt lernis ankaŭ finnan lingvon jam dum sia infaneco. Schildt naskiĝis en jaro 1810, iĝis doktoro de medicino 1840, kaj havis oficon en Jyväskylä, kie li mortis 1893.

Kiel formiĝis skribita literatura finna lingvo?

Svedoj okupis Finnlandon tra tiel nomitaj krucmilitoj, kaj aligis okupitajn areojn kiel partoj al la sveda ŝtato. La loĝantaro estis per forto baptita al la katolika religio. Do, la ŝtata lingvo estis la sveda, kaj nur hazardaj religiaj tekstoj estis tradukitaj al la finna. Kia estis la ortografio tiam? Certe ĝi ricevis multon de la sveda ortografio, eĉ erarigaj skribaĉoj: en Hankasalmi troviĝas bieno, kies nomo estas skribata SIKALA ("porkostalo" < *sika*=porko), sed laŭ la memoro de la popolo ĝi devus esti SIIKALA ("loko de koregonoj" < *siika*=koregono). Tia estis la situacio ĝis reformacio, ĉ. 1540–1640. Tiam komencis la vera evoluo de la skribita literatura finna lingvo.

Mikael Agricola (ĉ. 1510–1557) estas nomita patro de la finna literaturo. Li studis ankaŭ en Germanio kaj komencis tie traduki Biblion al la finna. Unue (eble 1543) aperis "Abckiria", Abc-libro. Ortografio havis certajn influojn ankaŭ el la germana.

1809 estis fondita la finnlanda ŝtato, kaj tio kreis fundon por evoluo de la uzo de finna lingvo, kvankam ankoraŭ daŭris jarcenton ĝis la normala uzrajto. Dum tiu periodo en Finnlando

vekiĝis nacia spirito. Multaj homoj laboris por iomete evoluigi finnan lingvon. Unu el la plej famaj el ili estis Wolmar Schildt, kaj ankaŭ alia viro el Laukaa, baptopatro de Wolmar, Adolf Ivar Arvidsson, kiu diris: "Ni ne estas svedoj, ni ne volas iĝi rusoj, do ni estu finnoj!"

Finna lingvo tiam enhavis multege da fremdaj vortoj kaj Schildt volis trovi novajn finnajn vortojn, kaj li sufiĉe bone sukcesis: Oni kalkulas ke la nuna lingvo enhavas 106 vortojn el la 500 proponitaj de Schildt.

Pli ol vortaj proponoj oni diskutis pri liaj proponoj ŝanĝi la ortografion. Schildt trovis, ke metodo skribi longajn vokalojn per du samaj literoj estas kontraŭ fonetiko: ne estas du unuopaj sonoj, sed pli longa samesona vokalo. Tial li volis, ke oni uzu supersignon por montri plian longon de vokaloj.

Do, oni multon parolis kaj skribis pri propono de Schildt, sed surprizo estas, ke li ne estis la unua, kiu proponis tion, kaj dua surprizo estas, ke la unua estis dano: filologo Rasmus Rask skribis 1818–1819 gramatikon por la finna lingvo, kaj tiam proponis montradon de longaj vokaloj per kromsigno. (Lia gramatiko restis nepresita.)

Jaakko Juteini eĉ uzis la proponon de Rask en ABC-libro "Lasten kirja", 1819, dua eldono, sed ne uzis poste. 1832 aperis de Rask libro "Ræsoneret lappisk Sproglære" kaj post tiu E. A. Ingman eldonis tradukokajeron "Lauluja Anakreonilta ynnä myös Laulu Sapfolta" uzante parte vokalsignojn de Rask. 1843 Ingman proponis ke la longeco estu esprimita kiel en hungara lingvo, per akuto-signo: á, é, í, ó ktp.

Nun, la uzo de kromsignoj estas por ni esperantuzantoj bone konata, "ĉapelo" estas ĉiutaga signo, kaj ĝuste tiun cirkumflekson Schildt

Festlibro al Humphrey Tonkin

Sabaton, la 9-an de januaro, okazis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo varmetosa aranĝo, dum kiu oni transdonis al prof. Humphrey Tonkin la festlibron "La arto labori kune" eldonitan de UEA okaze de lia 70-a datreveno. La transdonon ĉeestis 50 invititaj gastoj kaj multaj kontribuintoj al la festlibro.

La impona 900-paĝa libro konsistas el artikoloj, eseoj kaj rememoroj de tuta centoj da kontribuintoj. Al Tonkin precipe plaĉis la titolo de la festlibro, "La arto labori kune", kiel esprimo de la ideo, kiu ĉiam estis al li tre grava en lia agado. "La arto labori kune" kosta 60,00 eŭrojn kaj estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA kaj baldaŭ ĉe aliaj libroservoj.

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

Prelegoj pri Lapenna en reto

La Reta Kinejo de UEA proponas tri filmojn, kiuj konatigas la vivon de Ivo Lapenna en tre persona maniero. Temas pri la prelegoj, kiujn prof. Carlo Minnaja kaj prof. Duncan Charters faris en la Malferma Tago de la Centra Oficejo la 28-an de novembro.

Carlo Minnaja prelegas en du partoj, ambaŭ iom pli ol 50 minutojn. Li konatiĝis kun Lapenna

na jam kiel knabo, la eminentulo estis amiko de liaj gepatroj kaj la kontaktoj daŭris kiel movada kunlaboro, i.a. kiam Minnaja eĉ anstataŭis Lapenna kiel festparolanto en la Tokia UK. Duncan Charters elstarigis en sia 30-minuta prelego la kontribuon de Lapenna por antaŭenigi la lernejan instruadon de Esperanto kaj por seriozigi la informadon kaj dokumentadon pri Esperanto.

La prelegoj estas spektblaj ĉe <http://www.iperity.com/doc/97850/home/video>

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

Tri UEA-komisiitoj

La Estraro de UEA nomumis en decembro tri komisiitojn. Gabi Kosiarska fariĝis komisiito pri la Esperanta radiofonio, kampo, pri kiu ŝi ankaŭ profesie spertas pro sia laboro por la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio. Brazilano Emilio Cid, kiu jam kunordigis la gazetaran kampanjon pri la Bjalistoka UK, estis komisiito pri sama agado ankaŭ lige kun estontaj UK-oj. Robert Kaminski el Pollando ricevis taskon pri la dokumentado pri ZEO-j, t.e. Zamenhof/Esperanto-objektoj. Pro sankialoj retiriĝis el tiu tasko Raymond Boré, kiu en 2001 anstataŭis la faman veteranon Hugo Röllinger, aŭtoron de "Monumente pri Esperanto".

(el komunikado de UEA koncizigis mm)

proponis 1847 por montri longan vokalon, do â, ê, î, ô, û, ŷ. Por ä kaj ö uzo de dupunkto kaj ĉapelo samtempe ne eblus, kaj tial li proponis, ke ä kaj ö estu ŝanĝitaj al diagrafoj, æ kaj œ. Poste Schildt ŝanĝis sian sistemon tiel, ke li anstataŭis œ per dana litero ø. Fina ŝanĝo estis 1872 anstataŭigi duosonojn – diftongojn uo, yö kaj ie per punkto super la literoj o, ø kaj e. Li diris, ke li volas malpliigi finnan literaron, sed fine li proponis tute novajn literojn.

Wolmar Schildt estis fervora amiko de finna lingvo kaj popolo. Li laboris multe kaj uzis

ankaŭ monon por siaj ideoj, kaj ankaŭ sukcesis kun pluraj proponoj, precipe pri lernejoj fondiĝoj. Malsukceso estis liaj proponoj pri ortografio. Sed lia persona malsukceso kiel noviganto de la finna ortografio apenaŭ estis malsukceso por la lingva komunumo.

Pentti Makkonen

Konsulta literaturo:

[1] Mauno Jokipii (red.): Wolmar Schildt (1993)

[2] Encyclopaedica Fennica de Otava (1960)

UK en Hanoj 2012

La elekto de Hanojo kiel la urbo de la 97-a Universal Kongreso de Esperanto en 2012 estis la plej rimarkinda decido de la Estraro de UEA, kiu kunsidis en sia plena konsisto en la Centra Oficejo ekde la 10-a ĝis la 12-a de januaro. La Esperanto-movado de Vjetnamio havas jam longan historion, sed la Universalan Kongreson ĝi gastigos por la unua fojo.

La estraranoj devos ankoraŭ trakti kaj decidi pri multaj aferoj rete, ĉar pro la frua kunsidodato ekz. la financaj dokumentoj ne povis jam esti pretaj. Tio lasis al la estraranoj pli da tempo por interŝanĝi ideojn interalie pri stimulado de la nun okazanta diskuto pri nova strategia plano por UEA.

Kun Stefan MacGill, prezidanto de ILEI kaj ĝia observanto ĉe la Estraro de UEA, oni parolis pri la plua evoluigo de la instrua agado. La

Estraro gratulis ILEI pro la sentebpla plivigliĝo de ĝia agado post la pasintjara konferenco. Kun granda kontento oni notis la bonan starton de la Esperanto-ekzamenoj laŭ la normoj de la Eŭropa Referenckadro. Por la nova serio de elstaraj sciencaj verkoj, "Scienca Penso", en kiu jam aperis "La origino de specioj" de Darvino, la Estraro aprobis regularon kaj envicigis por aperigo kiel ĝia dua titolo la verkon "Lingvo kaj menso" de la fama lingvisto Noam Chomsky. Kiel observanto de TEJO partoprenis la kunsidon la nuna TEJO-volontulo Alexandre Baudry, kiu raportis i.a. pri la baldaŭa apero de la eldono 2010 de gastigantoj de la Pasporta Servo kaj pri la planata grafika reformo de la revuo "Kontakto".

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Aperis Pasporta Servo 2010

En komenco de februaro venis adreslibro de Pasporta Servo. Por multaj tio estis post longa atendo, ĉar en jaro 2008 okazis problemo inter presejo kaj poŝtado kaj multaj ne ricevis la libron kaj en jaro 2009 la libro ne aperis pro ŝanĝo de kompilanto, kiam Derk Ederveen post longa tempo adiaŭis la taskon. La nova plurhoma kompilanta teamo faris iom da evoluon: la sistemo nun funkcias ankaŭ en interreto, adrese <http://www.pasportaservo.org>, kie oni povas trovi freŝe ĝisdatigitajn datenojn kaj homojn, kiuj en la libro ne aperis.

